


ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2001/1

printempo/somero 2001

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*



**LUMO**

*Lumon* eldonas dufoje jare KEA, P.O. Box 2159, Sidney, BC, Kanado V8L 3S6  
<[www.esperanto.ca/kea/](http://www.esperanto.ca/kea/)>

*Lumo* ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association  
*Lumo* ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

## Enhavo de la numero

Novaĵoj de KEA, Alvoko el Brazilo .....	3
Venontaj renkontiĝoj .....	4
Artikoloj .....	5
Lingva politiko kaj impostoj (B. Arthur) .....	5
Torontanoj en televido! (C. Smith) .....	6
Lingvoj de Filipinoj (V. Medrano) .....	7
Internaciaj novaĵoj .....	10
Akreditoj de reprezentantoj de UEA ĉe UN kaj UNESKO .....	10
Premio Miyoshi por historia studo de UEA .....	10
Indikita la posteulo de Kep Enderby .....	11
1578 aliĝoj al la zagreba UK .....	11
Elekto de komitatanoj B: survoje al nova rekordo? .....	12
Plia agnosko de la E-ista agado por lingvaj homrajtoj .....	12
37,1% studus Esperanton! .....	12
Poezio (de V. Epp) .....	14
Krucvortengimo (D. Reble) .....	16-17
Malsanoj de la nerva sistemo en centhektara arbaro (S. Norvell) .....	18
Ŝerco plus Poemo (Manoel Borges dos Santos) .....	19

## La kolumno de la redaktoro

Esperantistoj estas transloĝigemaj homoj, kaj tial ne estas tiom surprize ke ankaŭ via redaktoro nun (jam!) forlasas Nov-Skotion. Je la fino de junio mi transloĝiĝos al nia ĉefurbo, Otavo, kie mi laboros ĉe la universitato (de Otavo). Nun ĉiuj posedaĵoj miaj troviĝas en skatoloj, sed feliĉe restas la komputilo en la oficejo, kaj per ĝi mi sukcesis kunmeti la jenan numeron. Mi ĝojas ke enfluis pluraj kontribuajoj de legantoj de la revuo, kaj mi substreku refoje kiom mi ilin bonvenigas. Leteroj al la redaktoro ankaŭ estus interesaj (pri iu ajn temo; nu, preskaŭ iu ajn, mi supozas). Bv. noti ke mi ankoraŭ ne scias mian novan retadreson; mi disdonos ĝin, kiam mi estos ekiginta mian novan konton tie.

Denove mi ŝuldas grandan dankon al Steĉjo Norvell pro lia afabla helpo en la kompostado de la revuo, kaj ĉi-foje al la tuta societo de Halifax-Dartmouth pro ilia helpo pri enkovertigo kaj elsendo.

Geoffrey Greatrex,  
602-125 Somerset Street West,  
Ottawa, ON K2P 0H7, KANADO.

Limdato por kontribuajoj al la venonta numero: 1a de decembro 2001

## NOVAĴOJ DE KEA

Mi havas la plezuron sciigi al vi ke la nova retpaĝaro de KEA estas preta: <<http://esperanto.ca/kea/nova>>. Sciu ke mi ne ŝanĝis la enhavon (krom kelkajn gramatikaĵojn); temas simple pri nova 'vizaĝo'. Oni rimarkos ke la nove proponita simbolo estas integra ero de la nova desegno. Ĉi tiun preferatan simbolon mi do proponas kiel oficialan de KEA. Ĝi ekanstataŭu la malnovan ĉie kie ĝi nun aperas (do kompreneble ankaŭ en niaj eldonaĵoj).

Arono (Aaron Chapman)

*Nd/R:* la estraro de KEA ankoraŭ ne decidis pri ĉio supra (ekzemple pri la anstataŭigo de la simbolo de KEA). Tamen sendube membroj interesiĝos pri ĉi tiu nova paĝaro (kiu intertempe eble jam troviĝas ĉe la kutima ejo de KEA, <http://esperanto.ca/kea>).


## ALVOKO EL BRAZILO

En la venonta julio oni inaŭguros en Rondonopolis, Brazilo, novan kaj modernan autobusan stacidomon. Rondonopolis estas urbo situanta en ŝosea kunfluejo kiu ligas sudon kaj nordon de Brazilo. Tra tiu stacidomo pasos 7 000 000 (sep milionoj) da pasaĝeroj jare. Nia Esperanto-grupo proponis al ties administrantoj, ke la stacidomaj ŝildoj en la portugala lingvo havu ankaŭ esperantan tekston. Ili emas akcepti la proponon, kondiĉe ke ni elmontru la vivecon, utilecon kaj gravecon de Esperanto. Tial ni petas ke esperantistoj tra la tuta mondo sendu al ili mallongan mesaglon, kies enhavo apogu la proponon kaj/aŭ servu kiel elmontro de la tutmondeco de la internacia lingvo. Mesaĝojn sendu al la adreso:

stacidomo@construmetron.com.br

kun temlinio: Nova stacidomo kaj Esperanto. Lingvoj komprenataj de la administrantoj: Esperanto, portugala, hispana kaj angla.

Karlo Perejra kaj Ilson P. dos Santos



## VENONTAJ RENKONTIĜOJ

### INVITO AL AŬSTRALIO

Salutojn el la Esperanta Ligo de Okcidenta Aŭstralio. Ni gastigos la venontan 18an Aŭstralian Somerkursaron de Esperanto en Perth (Perto), kiu okazos ekde la 5a ĝis la 18a de januaro, 2002 (dum nia varma somero!). La kursaro estos ĉe bela loko apud la Rivero Swan (Swan River, 'Cigna Rivero'), la Universitato de Okcidenta Aŭstralio, kaj la granda duonsovaĝa parko, Kings Park ('Parko Reĝa'). Ni tre bonvenigus eksterlandajn partoprenantojn. Por pliaj informoj, kontaktu Trish O'Connor, tel. (08)-9307-1964, e-poŝte, <trish7@tpg.com.au>.

Alan Mendelawitz, nome de la Esperanto League of Western Australia (la Esperanta Ligo de Okcidenta Aŭstralio).

### STRATEGIA FORUMO KUNSIDOS EN ZAGREBO

Estrarano de UEA, d-ro Petro Chrdle, kiu kunordigas la funkciadon de la Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo, dissendis al centoj da plej diversaj organizaĵoj kaj instancoj inviton al ĝia kvara kunsido. Ĝi okazos kadre de la 86-a Universala Kongreso en Zagrebo ĵaŭdon, la 26-an de julio de 14h15 ĝis 18h15 en salono Sekelj.

Partopreno en la Strategia Forumo estas malferma al ĉiuj organizaĵoj, kiuj uzas por sia agado Esperanton, kaj ĝi ne postulas akcepton de iaj tezoj aŭ kondiĉoj nek partoprenon en la kunsidoj de la antaŭaj jaroj. Ĉiuj kunvenantaj organizaĵoj estas egalrajtaj senrigarde al iliaj grandeco kaj agadkampo. Iliaj celoj povas esti plej diversaj, eĉ malaj inter si, sed ili dividas minimume unu komunan trajton: praktikan uzadon de la internacia lingvo Esperanto, kaj sekve ili komune kreas la Esperanto-komunumon.

La Strategia Forumo, lanĉita kadre de Kampanjo 2000, kunsidis unuafoje en la Montpeliera UK en 1998 kaj poste en la UK-oj en Berlino (1999) kaj Tel-Avivo (2000). La ĉi-jara Forumo okazos en la sama semajno, kiam la Komitato de UEA decidis pri nova laborplano de UEA. D-ro Chrdle skribas, ke UEA volonte konsideros en ĝia fina versio ideojn kaj proponojn de aliaj asocioj kaj instancoj de la Esperanto-komunumo. Tial li proponas diskuti pri ĝi, apud aliaj temoj eventuale starigotaj de la forumanoj. Li precipe emfazas la gravecon de praktika utiligo de Esperanto: 'Ni devus eniri novan fazon, en kiu la praktika utiligo de Esperanto por ĉiuj bezonoj de la normala vivo marku la efektivaĵojn kaj utilon de nia lingvo.'

Ankaŭ tiuj, kiuj eble ne ricevis skriban inviton, estas bonvenaj sendi reprezentanton. Por faciligi la preparojn, estos helpe, se oni anoncos la nomon de sia reprezentanto antaŭ la 15-a de julio al d-ro Petro Chrdle: poŝte (Anglická 878, CZ-252 29 Dobříčovice, Ĉeĥio), telefakse (+ 420 2 991 2126) aŭ rete (chrdle@kava-peĉ.cz). Antaŭa sinanonco tamen ne estas deviga.

Gazetara servo de UEA

## Artikoloj

### LINGVA POLITIKO KAJ IMPOSTOJ

Dum la pasintaj kelkaj jaroj mi korespondis kelkfoje pri Esperanto kun la 'Canadian Taxpayers' Federation' (CTF). Tio estas organizaĵo kiu laboras por reprezenti impost-pagantojn en Kanado, klopodante malpliigi elspezojn de registaroj, eĉ lingvajn elspezojn. Ĉi tiu artikolo priskribas la rezultojn de mia korespondado.

CTF kontraŭas altajn impostojn kaj deficitajn, kaj ĝi plendas kiam registaroj malŝparas monon. Ĝi ankaŭ volas plidemokratiigi Kanadon. La gazeto de la organizaĵo havas proks. 80,000 abonantojn. CTF havas sekcion en ĉiu provinco okcidente de Kebekio, kaj ĝi havas plurajn dungitojn.

En antaŭaj jaroj, la gazeto de CTF enhavis kelkajn artikolojn pri lingvaj kostoj en Kanado. Du gravaj artikoloj aperis en 1994 kaj unu en 1996. La artikoloj klarigis la lingvajn kostojn de la federacia registaro - por tradukado, instruado, kaj simile. La artikoloj plendis ke lingvaj kostoj estas tre grandaj, kaj ili proponis, ke la registaro evitu grandan parton de ĉi tiuj kostoj. Tamen la ideoj de CTF estis tre malklaraj al mi. Ekzemple, CTF diris, ke la registaro povus elspezi multe malpli se ĝi disponigus servojn en ambaŭ oficialaj nur tie, kie estas bezono. Mi ne sciis, kiel ĝi difinas 'bezonojn'. Ĝi ankaŭ diris, ke multaj kanadanoj kredis, ke oficiala dulingvismo estas disiga. Malklaris al mi, ĉu CTF opiniis ke ĝiaj ideoj estas malpli disigaj.

Mi skribis leteron al CTF por peti klarigojn pri iliaj ideoj. Mi ankaŭ skribis pri Esperanto kaj ĝiaj avantaĝoj. Oni povas instrui Esperanton por malpli granda kosto ol alian lingvon. Kaj se oni uzas Esperanton kiel neŭtralan laborlingvon, oni povus eviti iom da tradukokostoj. Mi ricevis de CTF ĝentilan leteron, kiu diris ke Esperanto estas studinda ideo. Tamen CTF apogus ĝin nur se analizo montrus, ke la gajnoj estus pli grandaj ol la kostoj. Mi reskribis por demandi ĉu CTF havis analizon pri la gajnoj kaj kostoj de siaj tiamaj ideoj. Mi ankaŭ denove petis klarigojn pri la artikoloj, ĉar la unua letero ne respondis al miaj demandoj. Tamen CTF neniam respondis al mia letero.

Mi skribis al CTF ankaŭ pri la Unuiĝintaj Nacioj. Artikolo en la gazeto de CTF en 1996 diris, ke la U.N. malŝparas monon, sed la artikolo ne donis ekzemplon. Mi demandis, ĉu CTF opiniis ke la lingvaj kostoj de UN estas ekzemplo de malŝparado. Neniu respondis. Mi pensis ke estus bone sendi al CTF analizon pri la eventuala uzo de Esperanto en la U.N. Tamen ŝajnis al mi ke tia analizo ne ekzistas. Sed en 2000 mi ricevis la libron *Esperanto en la Moderna Mondo*, kaj mi vidis ke ĝi havas artikolon pri tiu afero. La artikolo estis iom maldetala kaj malnova, sed mi opiniis ke ĝi estas studinda al iu, kiu volus reformi elspezadon en la U.N. Mi demandis min ĉu mi donu ekzemplon de la libro al CTF. Mi timis ke CTF forĵetus la libron sen legi ĝin, kaj mi ne volis vidi tian malŝparon: mi malamas vidi malŝparadon. Mi decidis skribi al CTF leteron, proponante ke mi donos al ili la libron, se ili petos ĝin. Mia letero ankaŭ mallonge priskribis la analizon en la libro, kaj ĝi memorigis ke CTF interesiĝis pri analizo pri la gajnoj kaj kostoj de Esperanto. Tamen neniu respondis al mia letero.

En 1998 CTF gastigis en Kanado mondan kongreson de impost-pagantoj. Mi skribis al CTF por proponi ke Esperanto estus bona temo por la kongreso. Partoprenantoj el diversaj landoj

povus kompari lingvajn kostojn en siaj hejmlandoj kaj paroli pri lingvaj kostoj de interregistaraj organizaĵoj, kiel la U.N. Tamen CTF ne respondis al mia letero, kaj la kongreso okazis sen diskuto pri lingvoj.

Konklude, miaj leteroj ne konvinkis al CTF apogi Esperanton. Mi ne certas pri la kialo. Sed aliflanke, post miaj leteroj, la gazeto de CTF diris preskaŭ nenion pri lingvaj kostoj. Tio verŝajne estas nur koincido, sed eble estas rezulto de miaj leteroj. Ĉiukaze, mi min demandas, ĉu CTF ankoraŭ opinias ke la kanada registaro malpliigu siajn lingvajn kostojn je multaj milionoj da dolaroj. Ĉu CTF ankoraŭ kredas ke tio eblas? Ĉu ili ankoraŭ interesiĝas pri la demando? Se ne, kial? Mi ne scias.

*Postskribe, mi volas aldoni ke mi skribis ankaŭ al alia organizaĵo, la 'Taxpayers Associations International'. Tio estas mondskala organizaĵo al kiu aliĝas CTF kaj aliaj landaj asocioj de impost-pagantoj. Ties sidejo estas en Svedio. Mi ricevis rapidan kaj ĝentilan respondon. La letero diris ke lingvaj kostoj interesas la organizaĵon, sed ili ne scias, ĉu Esperanto estas solvo. Ili mem komencis uzi unu solan laborlingvon, sed ili elektis la anglan. (Mi supozas ke la instruanto pagas registaroj, ne la organizaĵo mem).*

Bruce Arthur

### TORONTANOJ EN TELEVIDO!

La vesperon de la 9-a de aprilo, aperis en la retpoŝta kesto de Matthew Chisholm io tute ne atendita. Rachele Allin, la enscenigisto de la programo 'Chatroom' (Babilĉambro) petis ke kelkaj membroj de la Esperanto-Rondo de Toronto aperu en la venonta programo.

'Chatroom' estas ĉiutaga programo dissendata en la kanalo 'TalkTV', kiu videblas tra la tuta Kanado per satelito. Celante precipe junulojn, la programo prezentas diversajn temojn ĉefe per mallongaj konversacioj inter la partoprenantoj kaj la intervjuanto. Matthew tuj ekspedis mesaĝojn al klubanoj Clayton Smith, Kathy Toy, kaj Scott Dawson. Malgraŭ la malfrua atentigo fare de la televid-stacio, ĉiuj sukcesis atingi la studion ĝustatempe. La ŝminkisto preparis ĉiujn, kaj post nur kelkaj minutoj ĉiuj sidis sur la scenejo. La intervjuanto, Roberto, donis kelkajn klarigojn, kaj baldaŭ komenciĝis la filmado kaj samtempa dissendado.

Post kiam Roberto prezentis la partoprenantojn, li komencis demandi al Matthew pri Esperanto, sed ne rekte. Li diris siajn demandojn en la angla al Clayton, kiu samtempe tradukis ilin en Esperanton por Mateo. Matthew poste respondis en Esperanto, kaj Clayton denove agis kiel interpretisto, tradukante en la anglan por Roberto kaj la spektantaro.

Poste, ĉiuj babilis en la angla pri la internacia lingvo. Scott parolis pri la esperanta kulturo, kaj montris diversajn KD-ojn, librojn kaj gazetojn. Kathy klarigis kiel lerni la lingvon en la interreto aŭ per lernolibroj. Clayton menciis ke esperantistoj diskutas ne nur sian lingvon, citante ke antaŭ nur horo li diskutis kun sia itala amiko la ekziston de orta paralelepipedo kun entjeraj diagonaloj kaj lateroj. Mateo donis informojn pri la Esperanto-Rondo de Toronto, kiun li nun prezidas.

Sekvis reklam-paŭzo, sed antaŭ ĝi mallonga sed tre interesa programero. La tiel nomata 'ulo en la strato', alparolis hazarde elektitan preterpasanton, donis al li paperon kun kelkaj frazoj en Esperanto, kaj petis ke li penu elparoli ilin. La frazoj estis vere ridindaj, ekzemple 'Mi estas stulta napokapo.' Tuj post kiam la alparolato diris la frazojn, aperis subtitoloj anglalingvaj, kaj ĉiuj ridis.

Dum la lastaj kelkaj minutoj, Matthew donis lecionon pri Esperanto, helpate de siaj samklubanoj. Li instruis la alfabeton, la nombrojn, la prezencon, kaj la akuzativon. Li poste finis la programon, tradukante ties nomon en Esperanton laŭ la peto de Roberto.

Entute, la Esperanto-Rondo trafis tre bonan ŝancon disvastigi informojn kaj pri sia organizaĵo kaj pri sia lingvo.

Clayton Smith (Argilo)

### LINGVOJ DE FILIPINOJ

Pli ol 7100 vulkanaj insuloj sin banas jen en paca tropika suno, jen en perfortaj tajfunoj. Tio estas Filipinoj, lando de kontrastoj kaj paradoksoj, kunfandiĝo de la Okcidento kaj Oriento. Pri kio oni pensas kiam iu mencias la vorton 'Filipinoj'? Eble oni memoras la tromulton da ŝuoj de Imelda Marcos aŭ la revoluciojn kontraŭ koruptaj prezidentoj. Sed kompreneble Filipinoj estas pli ol nur tio. Filipinoj estas lando de diverseco kaj en popolo kaj lingvo.

Etnologia studo (<http://www.sil.org/ethnologue/>) listigas 168 vivantajn lingvojn parolatajn en Filipinoj. Ili estas ja tre diversaj. Pliparto da tiuj lingvoj apartenas al la Aŭstronezia (Malajo-Polinezia) lingvofamilio, al kiu ankaŭ la Havaja, Fiĝia, Samoa, kaj Indonezia lingvoj apartenas. El la indiĝenaj lingvoj de Filipinoj, ok ĉefaj lingvoj havas pli ol unu milionon da parolantoj. Tiuj kaj iliaj unualingvaj loĝantaraj procentoj estas [1] la tagaloga (29.3%), en parolantoj. Tiu kaj suda Luzon, kaj en la insuloj de Mindoro kaj Marinduque; [2] la Cebua (23.3%), en Cebu, Bohol, orienta Negros, okcidenta Leyte, kaj partoj de Mindanao; [3] la Iloka (9.3%), en nordaj partoj de Luzon; [4] la Hiligajnona (9.1%), en partoj de Panay kaj okcidenta Negros; [5] la Bikola (5.7%), en suda Luzon kaj Catanduanes; [6] la Varaj-Varaja (3.8%), en Samar kaj Leyte; [7] la Pampangana (3.0%), en partoj de centra Luzon; kaj [8] la Pangasina (1.8%), en centra Luzon. La Filipina loĝantaro estas nun pli ol 73 milionoj.

La nacia, kaj plej parolata, lingvo de Filipinoj estas la Filipina, kiu baziĝas sur la tagaloga. Praktike la tagaloga kaj la Filipina estas sinonimaj, sed teorie la Filipina estas plilarĝigo de la tagaloga. La tagaloga estas la plej riĉa de ĉiuj Filipinaj lingvoj kaj havas la plej vastan literaturon. La tagalogan parolas multaj Filipinanoj kiel duan lingvon. La lingvo estas instruata en lernejoj en tutaj Filipinoj.

La diversaj indiĝenaj lingvoj ofte estas tiom malsamaj ke oni ne interkompreniĝas, sed multaj vortoj estas similaj. Ekzemple, 'Multajn dankojn' estas, en la tagaloga, 'Maraming salamat' kaj estas, en la Cebua, 'Daĝang salamat'. 'Mia lando estas Filipinoj' estas Tagaloge 'Aking bayan ang Pilipinas' kaj estas Cebue 'Akong nasud ang Pilipinas'. Feliĉe por interkompreniĝo

inter aliaj etnoj, multaj Cebuanoj parolas ankaŭ la tagalogan. La tagaloga, la lingvo de la plej potenca etno (la Tagalogoj), estas la tut-Filipina komunikilo.

La tagaloga havas 20 literojn: A, B, K, D, E, G, H, I, L, M, N, Ng, O, P, R, S, T, U, W, Y. Ĝi havas simplan sonsistemon kaj havas fonetikan ortografion. La tagaloga gramatiko tamen estas morfologie pli malsimpla ol la Indonezia, ĝia kuza lingvo. La verbo ŝanĝiĝas al multaj formoj, depende de la tempo kaj la fokuso.

La historio de la Filipina kiel la nacia lingvo ampleksas pli ol 60 jarojn. La Nacia Lingva Instituto establiĝis la 13an de novembro 1936 sekve al la 'Commonwealth Act Number 184' por la studado de la Filipinaj dialektoj por evoluigi kaj adopti komunan nacian lingvon bazitan sur unu el ekzistantaj indiĝenaj lingvoj. Tio necesigis la studadon de ĉiuj indiĝenaj lingvoj parolitaj de pli ol duonmiliono da Filipinanoj kaj la elekton de lingvo kiel la bazo de la nacia lingvo. En 1937 la Instituto rekomendis la tagalogan kaj eldonis gramatikon kaj vortaron. En 1959 la Departamento de Eduko nomis la Tagalog-bazitan lingvon 'Pilipino' kaj ekdisvastigis ĝin. Estas multaj novaj vortoj kreitaj el malnovaj radikoj. La Konstitucio de 1973 do deklaris ke la Nacia Asembleo devus evoluigi kaj adopti komunan nacian lingvon nomitan 'Filipino', supozeble bazitan je Pilipino. Dume Pilipino kaj la Angla restis kiel oficialaj lingvoj. En la 1970aj jaroj, Pilipino enkondukiĝis kiel la lingvo de edukado kune kun la Angla.

La Konstitucio de 1987 deklaris, ke la nacia lingvo de Filipinoj estas Filipino, evoluanta kaj riĉigata je la bazo de ekzistantaj Filipinaj kaj aliaj lingvoj. Kiel Filipino kaj Pilipino malsamas? Filipino [1] havas pli da fonemoj aŭ literoj; [2] havas malsaman sistemon de ortografio; [3] havas pli da pruntvortoj el la Angla; [4] havas malsaman gramatikon. La aktuala Manila tagaloga estas la bazo de Filipino. Estas oportune, ke en Esperanto oni povus uzi la vorton 'Filipina' kiel sinonima ĝenerala vorto al la tagaloga, Pilipino, kaj Filipino. La malsameco de tiuj montras politikan tendencon.

Filipinojn koloniis dufoje Okcidentanoj. Filipinojn koloniis la Hispanoj dum 333 jaroj ekde la 16a jarcento. Post la Hispana-Usona Milito kaj ekde 1898 Usono administris Filipinojn. En 1946 Filipinoj gajnis sendependecon. Pro tiu kialo la aktuala paroladon de Filipinoj havas multajn pruntvortojn el la hispana kaj la angla.

La tipa tagaloga frazo 'Ang aking kotse ay azul' signifas 'Mia aŭtomobilo estas blua'; 'kotse' estas el la hispana 'coche' (aŭtomobilo) kaj 'azul' estas el la hispana 'azul' (blua). Se Filipinojn koloniis la Hispanoj dum 333 jaroj, kial Filipinoj ne parolas la hispanan? Fakte nuntempe malmultaj Filipinoj parolas flue la hispanan. Malsame kiel en Meksiko, la hispanaj monaĥoj ĝenerale ne instruis sian lingvon al la indiĝenoj por ke ili pli bone regu ilin, kaj malpermesis aliron al gravaj institucioj kiel la eklezio. Ankaŭ malsame kiel en Meksiko, malmultaj Hispanoj loĝis en Filipinoj. Ankaŭ kiam la Usonanoj alvenis, la novaj koloniistoj promociis aktive la anglan al la indiĝenoj. Sed fakte estas hispanbazita kreolaĵo, la Ĉavakana, kiun parolas ĉirkaŭ trionmiliono da Filipinoj.


Kiam alvenis la Hispanoj, ili enkondukis la latinan alfabeton al la indiĝenoj. Nuntempe ĉiuj ĉefaj Filipinaj lingvoj skribiĝas per la latinaj literoj. Antaŭe estis antikva indiĝena skribsistemo, kiu nomiĝas 'Baybayin'. En 1604 jezuita historiisto, Pedro Ĉirino, skribis en

dokumento *Relacion de las Islas filipinas* ke inter la insulanoj skribado kaj legado estis popularaj je Baybayin. Baybayin ampleksas seriojn da silaboj; efektive ĝi ne estas alfabeto, sed silabaro. Ekzemple, simbolo, kiu aspektas kiel inversa koro sonas kiel ba; kiam estas punkto super tiu, ĝi sonas kiel bi; kiam estas punkto sub tiu, ĝi sonas kiel bu. Antaŭe la tagaloga estis esence trivokala.

Tio estis la pasinteco de la tagaloga. Pri la estonteco, kio estos? Nuntempe la influo de la angla regas. En Manilo oni aŭdas familieran lingvon, kiun oni nomas 'Tagangla' (Taglish). Ĝi estas kunfandiĝo de la tagaloga kaj la angla. Multaj sentas, ke la Tagangla estas lingvaĉo. Ekzemplo de tio estas: 'By the way, may klase ako bukas. In fact, busy ako uong araw. Puwede bang magkita tayo next week?' (Parenteze, mi havos klason morgaŭ. Fakte, mi estos okupata la tutan tagon. Ĉu ni povas kunveni la venontan semajnon?) En amaskomunikiloj oni aŭdas kaj legas la Taganglan. Malgraŭ la registaraj politikoj pri lingva uzo de Pilipino aŭ Filipino, la Tagangla regas.

Tajlandanoj rigardas hollywoodajn filmojn kun tajaj subtitoloj. Indonezianoj rigardas hollywoodajn filmojn kun indoneziaj subtitoloj. Sed Filipinoj rigardas hollywoodajn filmojn sen subtitoloj. Fakte, pri la angla mem, 52% da Filipinoj asertas, ke ili scipovas ĝin. Sed tiu procento verŝajne malgrandiĝos en la estonteco! Pli kaj pli la tagaloga, la Filipina, enkondukiĝas en ĉiuj niveloj de la lernejoj. Eble estonte malpli da Filipinoj estos fluaj parolantoj de la Angla. En sia serĉo por nacia identeco, la Filipinoj sentas, ke la Filipina pli gravas al ili. Kaj estas dilemoj. La Angla estos ankoraŭ grava kiel interkomunikilo kun la ekstera mondo. Ankaŭ la Manilocentra Tagalogcentra lingva politiko sentiĝas de kelkaj ne-Tagalogoj kiel specon de nova koloniismo, pro kiu aliaj Filipinaj lingvoj paŝon post paŝo elpuŝiĝos. Tamen, multaj Filipinoj, inkluzive de ne-Tagalogoj, sentas, ke ili vere bezonas nacian lingvon.

Viktoro Medrano



## Internaciaj Novaĵoj

## AKREDITO DE REPRESENTANTOJ DE UEA ĈE UN KAJ UNESKO

Kadre de la oficialaj rilatoj de UEA kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko la Ĝenerala Direktoro akreditis la oficialajn reprezentantojn de la Asocio ĉe tiuj mond-organizaĵoj por la kalendara jaro 2000.

Ĉe Unuiĝintaj Nacioj UEA havas la statuson de specialaj konsultaj rilatoj kaj rajtas akrediti reprezentantojn ĉe ĉiuj oficejoj de UN. En Nov-Jorko la delegacio de UEA konsistas el Ulrich Becker, Daniel Cuthbert, Rochelle Grossman, Mark Fettes kaj Humphrey Tonkin. En Ĝenevo UEA estas reprezentata de Mireille Grosjean, Andy Künzli kaj Marion Belisle, kaj en Vieno de Hans Michael Maitzen, Renate Klag kaj Walter Klag. Kun Unesko UEA estas en operaciaj rilatoj. Ĝiaj reprezentantoj en Parizo estas Vincent Charlot, Barbara Despigny kaj Philippe Berizzi.

Gazetara servo de UEA

## PREMIO MIYOSHI POR HISTORIA STUDO PRI UEA

Por ke venontaj generacioj povu bone informiĝi pri la problemoj de la Esperanto-movado en la 1970-aj jaroj, la studgrupo Perspektivo volas stimuli per konkurso la verkadon de studoj pri tiu periodo. La kvin plej bonaj studoj pri la influoj de tiuj problemoj sur la tiaman funkciadon de UEA ricevos premion de 500, resp. 400, 300, 200 kaj 100 USD -- dank' al pluraj personoj, ĉefe la japana mecenato Etsuo Miyoshi.

La temo de la konkursaĵoj estu 'Universala Esperanto-Asocio en la periodo 1970-1980'. Ili ampleksu inter 10 kaj 50 paĝoj; la teksto estu esperantlingva kaj klare legebla. Eblas partopreni individue aŭ kolektive, sed oni donu klaran indikon pri tio. La konkursaĵoj atingu Flandran Esperanto-Ligon (Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio) antaŭ la 1-a de oktobro 2001. La verkinto uzu kaŝnomon; en aparta koverto estu indikitaj la vera nomo kaj la adreso. Tri kvalifikitaj personoj (po unu nome de Perspektivo, s-ano Miyoshi kaj UEA) pritaksos la verkojn per poentoj. La sekretario de Perspektivo redaktos la rezulton laŭ la poentumo kaj indikos la laŭreatojn. La studgrupo Perspektivo rajtos publikigi ĉiujn senditaĵojn.

Pliaj informoj riceveblas ĉe la membroj de Perspektivo; retpoŝte ĉe la kasisto: <alhu@xs4all.be>. Aktivuloj el la periodo 1970-80 estas petataj, se ili ne mem konkursos, disponigi sciojn kaj dokumentojn al partoprenemuloj. La prezidanto de la studgrupo Perspektivo estas d-ro Wim M.A. De Smet (Hertendreef 12, BE-2920 Kalmthout, Belgio; tel. +32 3 666 99 49) kaj la honora prezidanto la Nobel-premiito prof. Reinhard Selten.

Gazetara servo de UEA

## INDIKITA LA POSTEULO DE KEP ENDERBY

La nuna vicprezidanto de UEA, Renato Corsetti, estas proponita kiel posteulo de Kep Enderby, fare de elektokomisiono konsistanta el Roland Lindblom, Claude Nourmont kaj Syozi Keiko. La novan Estraron formale elektos la Komitato en Zagrebo dum UK.

D-ro Corsetti (Italio) gvidus okpersonan estraron, ankaŭ proponitan de la sama komisiono: prof-roj Lee Chong-Yeong (Koreio) kaj Humphrey Tonkin (Usono) vicprezidantoj; Ivo Osibov (Kroatio) ĝenerala sekretario; Michela Lipari (Italio) landa agado; Ans Bakker (Nederlando) financoj; Koffi Gbeglo (Togolando) Afrika agado kaj edukado; kaj Andrej Grigorjevskij (Rusio) informado. Laŭ ĉi tiu propono eksiĝus de la estraro, krom Enderby, ankaŭ Chrdele, Huĝimoto kaj Kniiivilä. Restus Lipari kaj Gbeglo, kaj ne enirus aliaj kiuj konfliktis kun Lipari en Montpeliero 1998, unuavice Amri Wandel, ĉefa organizanto de la israela UK.

Por komitataneco C estas ĝis nun kandidatigitaj Hans Bakker (Nederlando), Josep Franquesa Sole (Katalunio/Hispanio), Ulrich Lins (Germanio), Takeuti Yosikazu (Japanio) kaj Flory Witdoeck (Belgio), kaj la estraraj kandidatoj Corsetti, Tonkin, Osibov, Gbeglo, Grigorjevskij kaj Lipari. Inter la aliaj proponataj estraranoj s-ino Ans Bakker estas komitatano A kaj prof. Lee kandidatas por komitataneco B.

Renato Corsetti, eliranta vicprezidanto, estas samtempe ĝenerala sekretario de Akademio de Esperanto, ĉefestrarano de Itala E-Federacio, prezidanto de (ne funkcianta) Laborista E-Asocio en Italio, kaj plenumanto de pliaj oficoj. Do (preskaŭ) ĉie estanta, ĉie aktivanta, malgraŭ diversaj fartoproblemoj: la ofickumulado estas evidente vivelekto, pri kies riskoj li certe konscias. Per la prezidantiĝo, Corsetti (60-jara) kronus longan aktivulan karieron, kiu vidis lin jam prezidanto de TEJO en 1971-73, kaj UEA-estrarano en 1977-79.

Krom la konfirmo pri Lipari (53-jara), eble ĉe sia kvara mandato, la propono reaperigas Tonkin (62-jaran), eble ĉe sia sesa mandato. Efektive la diversaj proponoj (por la Estraro kaj Komitato) ŝajnas rekonduki al la sama generacio de (tiam junaj) okcidentanoj kiuj transprenis la gvidon de UEA tuj post la demisio de Ivo Lapenna, en Hamburgo 1974.

## 1578 ALIĜOJ AL LA ZAGREBA UK

Ĝis la 16-a de junio la nombro de aliĝintoj al la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo atingis 1578 el 57 landoj. Kun 197 aliĝintoj Francio daŭre okupas la unuan lokon antaŭ la gastiganta lando Kroatio, kiu ĝis nun liveris 182 aliĝojn. Ankaŭ Japanio kaj Germanio, kun respektive 165 kaj 156 aliĝintoj, apartenas al la kvaropo, kiu klare distingiĝas rilate la nombron de kongresanoj. La aliaj landoj kun minimume 25 aliĝintoj estas Pollando (71), Italio (67), Nederlando (54), Hungario (51), Britio (50), Belgio (44), Brazilo (32), Svedio kaj Svislando (po 30), Rusio kaj Usono (po 29), Hispanio (27), Ĉeĥio (26) kaj Litovio (25).

Gazetara servo de UEA

## ELEKTO DE KOMITATANOJ B: SURVOJE AL NOVA REKORDO?

Ĝis la 16-a de junio la Centra Oficejo de UEA ricevis 1124 kovertojn kun balotilo pri la Komitatoj B de UEA por la periodo 2001-2004. Tamen, ĉar oni rajtas resendi plurajn balotilojn en sama koverta, la CO taksas ke la fakta nombro de alvenintaj balotiloj estas ĉ. 1200. Ĝis nun la balotilo estis sendita al 5969 individuaj membroj, kiuj jam kotizis por la nuna jaro. Sekve almenau 20% el ili jam voĉdonis.

La limdato por la alveno de balotiloj estas la 7-a de julio. Se la aktiveco daŭros sur la sama nivelo, oni verŝajne superos la rekordon faritan en la voĉdonado antaŭ tri jaroj, kiam partoprenis 33,6% de la individuaj membroj.

Gazetara servo de UEA

## PLIA AGNOSKO DE LA ESPERANTISTA AGADO POR LINGVAJ HOMRAJTOJ

De la 16-a ĝis la 19-a de majo okazis en Sankt-Peterburgo konferenco de la Prezidenta Komisiono pri Homaj Rajtoj de Rusio kaj de la Sankt-Peterburga Centro 'Strategio' kun la ĉefa temo 'La homrajtaj komisionoj en la regionoj de Rusio - la akumulita sperto kaj perspektivoj de evoluo'.

Kiel reprezentanto de Rusia Esperantista Unio (REU) la konferencon partoprenis A.G. Junusov. Laŭ lia iniciato la konferenco inkluzivis en sia rezolucio rekonan mencion pri la homrajta agado de UEA kaj REU. La koncerna parto de la rezolucio tekstas: 'Partoprenantoj de la Konferenco aprezas la agadon de Universala Esperanto-Asocio kaj de Rusia Esperantista Unio en la sfero de defendo de la lingvaj rajtoj kaj firmigo de la toleremo en la mondo (ankaŭ en la islama mondo), kaj esperas pri evoluo de la fruktodona kunlaboro'.

Gazetara servo de UEA

## 37,1% STUDUS ESPERANTON!

Se vi iam foliumis la Unuan lernolibron de d-ro Esperanto, vi certe rimarkis en ĝi kuponon kun la teksto:

'Mi, subskribita, promesas ellerni la lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson.'

Kiel estas konate, oni neniam publikigis la rezultojn de tiu 'promes-kampanjo', sed supozinde la kvanto de la promesintoj apenaŭ havus ŝancon atingi 10 000 000, ĉar la eldonkvanto de la Unua Libro estis nur kelkaj miloj. Surbaze de tiu Zamenhofa demando REU-aktivuloj en la dua duono de majo okazigis surstratan enketadon, en kiu estis ankaŭ demando pri kondiĉoj dezirataj por oni eklernu la lingvon. Ni tamen rekalkulis, ke 10 milionoj de 1887 proksimume ekvalentus al 50 nuntempaj milionoj.

Kaj jen la ĉefa rezulto: 37,1% da respondintoj pretus studi Esperanton jam nun aŭ se ĝin parolus 50 milionoj en la tuta mondo! La enketado okazis en 7 rusiaj urboj: Kazanj, Volgograd, Irkutsk, Vladivostok, Ivanovo, Kostroma kaj Ĉeboksary. Sume estis pridemanditaj 784 personoj.

La unua demando en la listo estis 'Ĉu vi scias, kio estas Esperanto?' Al tiu demando pozitive kaj korekte respondis averaĝe 43,9% da respondintoj. La cifero mem sufiĉe variis de urbo al urbo: de 24,7% en Volgograd ĝis 51,2% en Ivanovo. (En Ĉeboksary pri Esperanto sciis 59,5% da respondintoj - sed entute estis pridemanditaj nur 37 personoj. En Vladivostok sciis 92,9% (el 56 demanditoj) - tamen ili ĉiuj estas studentoj de Vladivostoka universitato, kie oni i.a. instruas Esperanton.)

La dua - 'Zamenhofa' demando enhavis eblecon elekti la kondiĉojn ĉe kiuj oni pretus ekstudii la lingvon:

a) 'se mi scius kie kaj kiam mi povas lerni Esperanton' - tiun kondiĉon elektis:	25,1%
b) 'se Esperanto estus parolata de 50 milionoj da homoj en la tuta mondo':	12,0%
c) 'se Esperanton parolus la tuta mondo' (ni konsideris tion negativa respondo):	31,3%
ĉ) ne volus lerni (aŭ havis aliajn malfacile plenumebajn kondiĉojn):	31,6%

Aliaj interesaĵoj:

Plejparto de la respondintoj estis studentoj (en kelkaj urboj nur studentoj), iom pli ofte ineksaj (ne ĉiuj urboj prezentis pri tio statistikojn). I.a. tiel okazis, ĉar mem la enketintoj estas tiaj. Sed statistikaĵoj pri la urboj, kie oni pridemandis ne nur studentojn montras, ke sufiĉa intereso pri Esperanto ekzistas ankaŭ en aliaj grupoj de la loĝantaro.

★ en Ivanovo la enketantoj renkontiĝis tri personoj (nekonataj), kiuj kapablis paroli Esperanton (entute en Ivanovo estis pridemanditaj 166 personoj). Bona procentaĵo!

★ estis multaj amuzaj respondoj pri tio, kio estas Esperanto, kiam respondintoj fakte ne sciis: iuj pensis, ke tio estas danco, poezia mezuro, pozicio de Kama-Sutra, stratnomo (en Kazanj, kie vere estas tianoma strato) ktp.

Sed revenu ni al la Zamenhofa demando: ĉu troviĝus en la nuna mondo 50 milionoj da personoj, kiuj promesus lerni Esperanton, se montriĝus, ke tian saman promeson donis tioma kvanto da homoj? Mi kredas, ke jes. Ja nur en Rusio kvarono de la t.n. aktiva loĝantaro pretas doni tian promeson aŭ eĉ tuj ekstudii la lingvon. La loĝantaro de Rusio en 2000 jaro konsistigis 146 739 413 personojn, el kiuj en la aĝo 14-30 jaroj estas 17 604 470 personoj. Se ni akceptos, ke la ricevataj statistikaj donitaĵoj respegulas la realan staton, ni povas kalkuli, ke eĉ en unusola Rusio la promeson donus ĉ. 4,5 milionoj da gejunuloj kaj eble ne malpli da homoj el aliaj aĝkategorioj. Kaj ĉiuj rusianoj konsistigas nur ĉ. 2,5% da la monda loĝantaro.


Dankegon al ĉiuj, kiuj kunlaboris, speciale al la lokaj kunordigintoj Eŭgeno Delcov (Irkutsk), Edik Kolosov (Volgograd), Aleksej Kuznecov (Kostroma), Aleksandr Galkin (Kazanj), Aleksandr Titaev (Vladivostok), Danil Kapitonov (Ĉeboksary), Natalja Grigorjevskaja (Ivanovo) kaj iliaj teamanoj!

Andrej Grigorjevskij (el ret-info)

## POEZIO

## HO POTENCA SKINO

Mi revenis, ho grandega Skino [Skeena], rivero de brumoj, kanto de mia animo, kaj mi estas malgaja. Mi estas laca hodiaŭ. Mi neniam estis tiel malgaja. Mi neniam estos pli laca. Miajn vortojn, miajn pensojn, mi verŝos en vin, enfluriveron de aflikto, por ke vi portu la kanton de mia animo el tiu-ĉi antikva valo kaj tondru ĝin super la teron antaŭ ol vi forcedu nin ambaŭ al la silenta, anonima oceano.



Al la gento de la krucvojo kaj de Nasrivero [Nass], vi parolu mallaŭte. Dolĉe murmurante, portu pacon kaj trankvilon al la gemaljunuloj; ludece faletante, estu ĝojo por la gejunuloj. Gracie kaj orgojle ŝveligante, preterfluu la hejmon de miaj gepatroj kaj tiujn de miaj gefratoj. Diru al ili nenion pri mia soleca reveno. Kantu nur pri miaj agoj, imagitaj kaj malveraj, en la animfrakasanta urbo de la blanka sudo. Kaj kiam la vilaĝanoj demandas pri siaj filoj kaj filinoj en tiuj samaj urboj, vi murmuru trankviligante kaj ŝparu vian senesperajn flakojn por la arbara ŝirmo. Iru silente preter la preĝejo, granda rivero, ĉar ni havas nenion por diri al ĝi. Mallaŭte ŝtelpaŝu preter la domo de la blanka pastro. Ne diru al li ke lia Dio estas antaŭjuĝa, ĉar li tion ne komprenus. Li scias tiom malmulte pri la mondo.

Kaj kiam vi venos al la urbeto, granda Skino, lasu ke via ŝvela voĉo rakontu mian angoron, ke via tondro estu mia kolero. Kirlo kaj riproĉu, subbruu kaj muĝu dum via tuta ĉirkaŭiro de tiu blanka loko. Kriu kiel ili, iliaj fratoj ĉe la marbordo, uzis, misuzis kaj rifuzis min kaj, per via malvarma ŝpruco, ŝoku ilin. Forlavu la Midas-an ŝlimon el iliaj okuloj kaj purigskrapu iliajn krustajn konsciencojn ĉar, meze de iliaj okupataj senzorgaj vivoj, nacio vivas pereante.


Granda Skino, rivero de brumoj, kantu pri mia elĉerpita animo, balau antaŭen al la lasta rendevuo. Ŝtele liveru min al la silenta anonima oceano. Neniu iam ajn scios kie mi kuŝas, sed via kanto, la kanto de mia animo, restos por eĉiĝi en la antikva valo.

Colin Campbell [Kolin Kambl] kaj Shirley Culpin [Ŝirli Kulpin]

Elangligis Victor Epp, 1986

TRILUSSA (pseŭdonimo de Carlo Alberto Salustri, Romo 1871- )

## LAMPIRO



La plena luno turmentetis lampiron:  
'Estos pro la efiko de ŝparemo  
sed la lumo kiun vi portas iom malfortas'.  
'Jes,' diris la lampiro, 'sed tiu lumo min apartenas!'


## LA HOMO KAJ LA SIMIO

La homo diris al la simio  
'Vi tre malbelas, impertinentas, ridindas!  
Kiom vi strangas!  
Nur vidi vin ridigas min  
Mi ridas oni ne scias kiom!  
Kaj la simio respondis, 'Kompreneble!  
Mi vin similas tiom!'



## LA FELIĈO

Estas abelo kiu sin demetas  
sur rozeton,  
ĝin suĉas kaj forflugas ...  
Sume, la feliĉo  
estas nur eta afero.



— Tradukitaj 1986 far Victor Epp el la roma dialekto de la itala.



Artikolo pri Esperanto en la TTT aperas je:


<http://www.suite101.com/article.cfm/1482/63384>

kun la titolo:

"La Mondo Ne Havas Atendejon: Esperanto Moves Ahead".

Ĝin rekomendas Brian Kaneen kaj Paul Hopkins.

### KRUCVORTENIGMO



Radikalon indikas la signo: /.

Difinoj ĉe la sekvanta paĝo:

Difinoj por la krucvortenigmo ĉe la antaŭa paĝo:

Transen:

- 1 tuj apud
- 3 ne plu kutima
- 9 mallongigo de suben-12
- 13 esprimo de konsterno
- 14 malhele bruna koloraĵo/
- 15 nedifinita sufikso
- 16 kuniĝo
- 17 alta titolo/
- 19 instrumenta sufikso
- 20 aliigi/
- 21 malveni/
- 22 ĝoje voĉbruos
- 24 bonhumorema/
- 26 malpliiga prezo
- 27 interjekcio por montri malkontenton
- 28 regula streketaro
- 30 proksimiĝas
- 32 tranĉfrapas
- 34 subaro de homaro
- 35 gazet-aĉetintan
- 39 radikalo de transen-70
- 40 soldathejmo
- 42 artikolo
- 43 ega banujo
- 46 komerca kunveno/
- 48 publikigi/
- 49 digestorgano/
- 51 supragambo/
- 53 bezonata
- 55 Ne babiladu, sed \_\_\_!
- 56 defie

- 58 netransitiviga afikso
- 59 kvanto de surfaco
- 60 membro/
- 61 tiea
- 63 blankigaĵo/, kiel kreto
- 66 ripeta prefikso
- 67 animplezuro
- 69 substanca sufikso
- 70 lirikan poemon
- 71 trudantan pro graveco
- 72 disdivida prepozicio

Suben:


- 1 hotelon
- 2 resono
- 3 Kaneen, Hopkins, du Temple, kaj aliaj
- 4 dependiga konjunkcio
- 5 plenigas pulmojn
- 6 batalegi/
- 7 akvoŝprucigo sur iun
- 8 karegas
- 9 jure decidi/
- 10 frakcia sufikso
- 11 proksimeca vorteto
- 12 eta Johano
- 18 tirante rompiss
- 23 sekve
- 24 vizitanto/
- 25 direkta prepozicio
- 27 esprimo de surprizo
- 28 neĝglitilo

- 29 sukervegetaĵo/
- 31 metalplata
- 32 dudekkvarono de tago
- 33 knabino/ de verdaj gabloj
- 35 laborbesto/ kun longaj oreloj
- 36 difavori/
- 37 diferenca
- 38 sensentiga drogo
- 40 borderaĵo/
- 41 grava ludkarto
- 44 plendsonu
- 45 ĉielkoloro/
- 46 terkavilon
- 47 dediĉdonaco
- 49 teatran aktparton
- 50 trinkaĵo/ de folioj
- 51 bestbuŝego
- 52 sufikso de grandeco
- 53 mi kaj aliaj
- 54 nivelo de nubskrapaĵo
- 56 sinsekvo/
- 57 rima verko/
- 59 haŭtmakulo/
- 62 cerbujo/
- 64 daŭriga sufikso
- 65 dekseca litero
- 68 certe

Multan dankon al la kreinto,  
Don Reble




## MALSANOJ DE LA NERVOSISTEMO EN CENTHEKTARA ARBARO




En la februara numero de *Inter Ni* estis recenzo. Temis pri ĉarma ŝercartikolo en veterinara periodaĵo pri malsanoj de pluŝursoj. Nun ŝajnas ke tia humuro troviĝas ne nur ĉe bestokuracistoj. En la *Kanada Medicin-Asocia Ĵurnalo* (12an de decembro, 2000, Vol. 163, N° 12, paĝoj 1557-1559), aperis artikolo kiun verkis teamo de pediatriaĵoj en Halifakso. La aŭtoroj (Sarah E. Shea, Kevin Gordon, Ann Hawkins, Janet Kawchuk kaj Donna Smith) studis la animalojn kiuj loĝas en la arbaro kie ludas eta knabo, Kristoforo Robin. Oni povas legi pri la afero en vaste legata libro fare de A. A. Milne, *Winnie-La-Pu* (unua eldono 1925), kiun el la angla tradukis I. Reed kaj R. Lewin, kaj eldonis E. P. Dutton, New York, 1972.

La ĉefrolulo en la fantazia libro estas pluŝurso nomata Winnie-La-Pu (angle: Winnie The Pooh) (pr: ŬIN-i-la-PU). La kanadaj kuracistoj opinias, ke la eta ŝajnurso suferas de sindromo de atentomanko kaj hiperaktiveco (AMHA). Ili ankaŭ maltrankviliĝas pri la obseda konduto de la besteto pro ties psika fiksiĝo al manĝado ĝenerale kaj aparte al manĝado de mielo. Tia konduto kondukas al obezo. La aŭtoroj demandas, ĉu la urseto suferas pro skuitursida sindromo (tipo de cerba vundo), la rezulto de nenormala metodo de transporto (Kristoforo Robin kutime tenas la dorlotbeston per unu pluŝbrako kaj permesas la urskapon frapi la ŝtuparon).



La aŭtoroj diagnozas en la azeno, Eeyore (pr: I-or), sindromon de deprimo pro ŝoka sperto, en ĉi tiu kazo pro amputo de la azenvosto. Ili opinias, ke Strigo suferas legkapablan misstaton, kaj ke la kuniklo, Rabbit (pr: RA-but), suferas de narcisismo ĝis patologia grado. Ili rimarkas, ke la kangaruo, Kanga (pr: KAN-ga) estas senpartnera patrino kiu estas senlabora kaj nenormale troprotektita al sia ido. Tigger (pr: TIG-er), la pluŝtigreto, kiel Winnie-La-Pu, afliktiĝas pro sindromo AMHA. Por ĉiu ano de la bestaro la verkistoj ne nur malkovras diagnozo(j)n, ili ankaŭ preskribas al ĉiu taŭgan medikamenton kaj faras sugestojn por trakti la respektivajn psikologiajn kaj sociajn problemojn.



Ĉe Kristoforo Robin mem, la aŭtoroj ĝis nun ne rekonas iun diagnozeblan malsanstaton, sed ili rimarkas ke estas nebonprognoza manko de gepatra direkto dum li ludas en la Centhektara Arbaro kun sia bestoamikaro. Ili ankaŭ spekulativas, ke povus estontaje minaci la knabeton problemoj pri seksa identiĝo. Ili starigas la demandon, ĉu povintus profunda psikologia (eĉ Freŭda) kialo, ke la knabeto elektis por sia pluŝurso la nomon, "Winnie-La-Pu".

— Steĉjo  
(Represita el *Inter Ni*)

## ARBARA AVERTO



Nuntempe en norda Kalifornio estas problemoj pri sovaĝaj ursoj en la arbaro. La registaro rekomendas, ke vagantoj en la arbaro kunportu pipropistolojn por defendi sin kaj alkroĉu ĉenojn de sonoriletoj ĉirkaŭ la maleoloj por averti la ursojn.

Estas du specioj de ursoj: nigraj kaj grizaj. Ili estas facile distingeblaj: la nigraj ursoj estas aŭ brunkoloraj aŭ nigrakoloraj, malgrandaj, preferas ne renkonti homojn, kaj efektive ne estas tiom ferocaj. La grizaj ursoj estas grizaj, tre grandaj, furiozaj, odoras de pipro, kaj oni povas aŭdi tintadon en la ventroj.



## ESPERANTO KAJ INTERRETO! ...

Izolita en ĉi mondo — ĝi senlimas,  
Sen kunuloj por parolo kaj kompren'  
Vivas mi en la dezerto de mi mem,  
Des pli mi amadas, plendas, ploras, timas ...

Radikalas la ŝanĝado ... Jam ne plu  
Samas eĉ la ritm' antikva de l' poemoj ...  
Mankas nur ke stumblaj versoj kaj fonemoj  
Lame paŝu, dum parad' tra l' avenu'! ...

Kie sin trovas kunular' el Interreto,  
Mi ne aŭdas plu la voĉon eĉ skribita ...  
Blokumita inter muroj elgranitaj,  
Afliktiĝas mia koro de Poeto ...

— Dokito (Manoel Borges dos Santos)  
Muritiba - Brazilo




## FINA NOTO DE LA REDAKTORO

Eldonkvanto de ĉi tiu numero: 300


Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi al ni siajn taksojn, opiniojn, sugestojn kaj kritikojn, kio ebligos plibonigon de la revuo. *Lumo*-n senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiu KEA havas interkonsenton pri interŝanĝado de revuoj.

**LA AVENTUROJ DE SUPERZAM MODERNA HEROO**  
N.RO 2


EN LA URBO NENOPOLA, ĈIO ESTAS EN ORDO ...



ĈIS EN LA NENOPOLA ĈIELO APERAS STRANĜA FLUGMAŝINO ...



KIU KOMENCAS DETRUI PONTAĴIN KAJ GRAVAJN KONSTRUKTOJN!



ŜAJNAS, KE KELKAJ URBANOJ JAM KONAS TIUN, KIU FARAS LA DETRUON ...

ĈU NE ESTAS ... ?  
JES, ĈERTE ... !  
ESTAS TIU DEMONO ...

... KRANIULO !  
JES JA, ĜENENO-POLANOJ ... !



...MI DETRUOS VIAN TUTAN URBON, KAJ NENIU POVOs MIN HALTIĜI!  
**HA-HA-HA!**

TAMEN, EN LA AMASO TROVIĜAS LA DU ĴURNALISTOJ, KIUJ SENDAS MESAĜON AL LA ŜTALA VIRETO ...

HELPON! HELPON!  
**SUPERZAM!**  
HELPON!  
HELPON!



EN JU KAŜITA ANĜULO DE PROKSIMA UNIVERSITATO, LA MESAĜON RICEVAS LA TIMEMA DOKTORO LAPLUMO, ALINOME -

**SUPERZAM!**



KIU FLUGAS TUJ KUN MIRINDA FORTO AL LA DANĜERA LOKO ...

TAMEN, LA FIA DEMONO -

**KRANIULO -** ATENDAS LA ALVENON DE NIA MODERNA HEROO ...


MI VIN MORTIĜOS, SUPERZAM!

... KAJ PER SPECIALA ARMILLO, LI DIREKTAS MIS-TERAN FLAVAN RADION KONTRAŬ LIN!



SUPERZAM EKALAS AL LA TERO, KAJ KRIAS AL SIAJ DU AMIKOJ DU RETO KAJ RIKO ...

HELPU MIN!



KIO OKAZAS AL NIA HEROO? KIU ESTAS LA MISTERA KRANIULO? KION FAROS RETO KAJ RIKO POR SAVI SUPERZAM? NEPRE LEGU LA SEKVON EN "KIAL NE?" JANO